

En viaj manoj troviĝas libro kiu pritraktas ekslusive esperantajn sinonimojn. Entute estas pli ol 2400 el ili sur la 80 paĝoj de la libro. Kelkaj vortoj kaj sinonimoj estas relative facilaj kaj eĉ komencanto povas respondi sukcese en malgranda parto de la ekzercoj. La plimulto, tamen, estas aŭ iom malfacilaj aŭ tre malfacilaj.

Plejparte ĉi tiu verko baziĝas sur la libro *Esperantaj Sinonimoj* de Jaan Ojalo, kaj la *Plena Ilustrita Vortaro* de Esperanto. En kazo de dubo, vi povas konsultu la libron *Esperantaj Sinonimoj* ĉar mi ne listis ĉiujn eblajn respondojn por ĉiu vorto en la ekzercoj kaj ekzamenoj.

Kiam vi traverkas ĉi tiun libron ne pensu ke la du sinonimaj vortoj de la ekzercoj egalvaloras. Preskaŭ ĉiam la du "sinonimoj" malsamsencas iamaniere. Ekzercu vin. Per via sperto, per la vortaroj, per via nacilingvo, per fremdlingvoj, kaj per la vortfaradsistemo de Esperanto mem, klopodu trovi diferencojn inter la du "sinonimaj" vortoj.

Ekzemple: *astronaŭto* estas sinonimo de *kosmonaŭto*, sed kia estas la diferenco? Kaj *kroĉilo* kaj *hoko*? Ĉu ĉiu kroĉilo estas hoko? Jes? Ne? Pensu pri la nuancoj kaj lernu!

En la vortlernigilo estas 10 vortekzamenoj. Antaŭ ol komenci la Vortlernigilon, vi jam povas fari la unuan ekzamenon por trovi vian nivelon. Ne zorgu se via poentaro estas malalta. Post kiam vi komencos uzi la libron iom post iom vi lernos novajn vortojn kaj ĉefe novajn nuancojn, kaj viaj rezultoj en la aliaj ekzamenoj kreskos kaj kreskos. Ĉe la fino de la libro, se vi studos multe, vi konstatos, ke via lasta ekzameno estos multe pli bona ol la unua.